



**Esperanto
Societo
Frankfurto**

**aŭgusto
septembro 2015**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

ESPERANTO INFORMILO

**Esperanto-
Gesellschaft
Frankfurt am
Main**

www.esperanto-frankfurt.de

1. Vorsitzender:
Martin Schmitt
Gießener Str. 18
35415 Pohlheim
Telefon: abends
0171-7412414
E-Mail:
esperanto@scsy.de

Bankverbindung:
Esperanto-Gesell-
schaft Frankfurt /M.
**IBAN: DE75 5008 0000
0771 5717 01**
BIC: DRESDEFFXXX
Commerzbank
Frankfurt/Main

Beitrag:
mit DEB-Beitrag: 80 €
Familienmitglied: 40 €
Nur ESF: 20 €
Familienmitglied: 10 €

SOMERA FESTO



foto: jens rabenstein

Nia somera festo estis la plej varma okazintaĵo de la jaro. La temperaturo plialtiĝis ĝis 39° C! La ombroj en la ĝardeno de la familio Rabenstein ne helpis multe. Tamen la festo estis bela – kiel ĉiam - bongustaj viandoj, salatoj kaj kukoj, interparoladoj pri diversaj temoj, ĝuo de floroj kaj la trampolino kiun ĝuis Alexander Fellmann.

einladung zum klubabend

invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

donnerstag, d. 6.8.2015

ĵaŭdon, la 6an de aŭg. 2015

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
mit diesem Esperanto-Infomilo laden wir Sie zu zwei unserer Haupttreffen ein. Eines wird am **6. August** und das andere am **17. September** stattfinden.
Wie jedes Jahr, so auch in diesem, die Saalbau hat Ferien und wir können die Räume nicht benutzen.
Wir wünschen ihnen allen schöne Ferien, egal ob Sie unterwegs zu bekannten oder unbekanntem Zielen sind oder einfach zu Hause.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
per ĉi tiu Esperanto-Infomilo ni invitas vin al du, ambaŭ ĉefaj, niaj renkontiĝoj: al la unua la **6.an de aŭgusto** kaj al la dua la **17 an de septembro**.
Kiel ĉiujare tiel ankaŭ en 2015 la Saalbau ferias kaj ni ne povas uzi la salonojn.
Ankaŭ al vi ĉiuj ni deziras belegan ferio-tempo, egale ĉu survoje al konata aŭ nekonata celo aŭ simple hejme.

18.30 h

SPRACHRUNDE

Manchmal hat man kleinere oder größere Probleme auch in so einer leichten Sprache wie Esperanto. Diese Sprachrunde wird eine „Frage-Antwort-Runde“. Eine(r) fragt etwas, andere(r) antworten. Wir bitten alle daran teilzunehmen. Es ist leichter als viele denken.

LINGVA RONDO

Foje ni havas malgrandajn au grandajn problemojn ankaŭ en tiom facila lingvo kiel Esperanto. Ĉi tiu lingva rondo estas „demando-respondo-rondo“. Iu demandas ion, iu alia respondas.
Ni petas ĉiujn partopreni ĝin. Tio estas pli facila ol multaj opinias.

ĈIUJ

19.30 h

100. Universala Kongreso Lillo

Ĉi-jara la Univesala Kongreso estas specio-kazis jam en 1905 sed du mondmilitoj Kelkaj el niaj membroj partoprenos la Stecay, raportos pri la laboro, kongreso en la urbo Lillo.

Der diesjährige Esperanto-Weltkongress ist ein besonderer – gress war schon 1905, aber die tät unterbrochen.
Einige unserer Mitglieder werden am Kongress teilnehmen und sie wer- über die Arbeit, Veranstaltungen und Ausflüge des Kongresses und über die Stadt Lille berichten.



ala - la centa. La unua kongreso interrompis la kontinuecon. kongreson kaj ili, kune kun Anina aranĝoj kaj ekskursoj de la kon-

kongress ist ein besonderer – gress war schon 1905, aber die tät unterbrochen.

Kongress teilnehmen und sie wer- über die Arbeit, Veranstaltungen

100. Esperanto-Weltkongress, Lille

**geburtstage im august und
september**

**naskiĝtagoj en aŭgusto kaj
septembro**

Dr. Klaus Rumrich, 01.08.
Angelika Pfafferodt, 09.08.

Ewald Glauer, 14.08.
Dr. Anina Stecay, 29.08.

Dennis Wibrow, 24.09.

Ni gratulas!

donnerstag, d. 17.09.2015 **ĵaŭdon, la 17an de sept. 2015**

SPRACHRUNDE

18.30 h

LINGVA RONDO

sprichwörter und redewendungen


proverboj kaj parolturnoj

hartmut horeth

19.30 h

schlaganfall und herzinfarkt

Schlaganfall und Herzinfarkt sind in allen Zivilisationen weit verbreitete Krankheiten, und in gewisser Weise hängen sie auch miteinander zusammen. Aber wie entstehen sie eigentlich?



Was muss ich beachten, wann den
Rettungsdienst rufen? Und was passiert mit mir, wenn ich mit einem Herzinfarkt oder
Schlaganfall ins Krankenhaus eingeliefert werde?

Apopleksio kaj korinfarkto estas oftaj malsanoj en ĉiuj popoloj, kaj iasence ili dependas unu
de la alia. Sed kio kaŭzas ilin? Kion mi devas atenti, kiam mi devas voki la ambulancon? Kaj
kio okazos al mi, se mi estos en hospitalo pro korinfarkto aŭ apopleksio?

La prelego intencas klarigi la mekanismojn de tiuj malsanoj kaj tiel ankaŭ la nuntempajn
terapiojn.

apopleksio kaj korinfarkto

D-rino Anina Stecay

Bona jaro

Anina Stecay

“Hieraŭ kadavro de 41-jara virino estis trovita en Bernkastel-Kues, sur kampadejo proksime de la rivero Mozelo. Policparolisto Hopfe antaŭtagmeze sciigis ke la kazo similas al la decembra trovo de kadavro en la sama regiono kaj la januara morto de japana turistino proksime al la Mozela bordo. Ambaŭ kazoj ankoraŭ estas esplorataj. La polico ne ekskludas la eblon ke en ĉiuj tri kazoj la murdinto estas la sama, ĉar la mortintinoj havas similajn vundojn. Supozeble temas pri seksa perforto. Ĉiuj viktimoj estis strangolitaj.

Male, al la demando, ĉu la tri kazoj estas ligitaj al kadavro de 14-jarulino, kiu verŝajne mortis pro pikvundo kaj montris ankoraŭ ne klarigitajn spurojn de brulvundoj, la policparolisto ne respondis. La mortan knabinon oni trovis pasintan merkredon en vitejo de Traben-Trarbach. Por la esplorado de la kazoj la polico starigis specialan komisionon.”

Rideto de amuzo videblis sur la vizaĝo de la viro finleganta atente la artikolon. Poste li orde kunfaldis la gazeton kaj metis ĝin en la poŝon de sia malhelblua anorako. Ja ankoraŭ estis februaro, tamen la vetero jam printempis, kaj oni metis eksteren la tablojn de la restoracio. La viro estis en bona humoro kaj tostis kun kolombo kiu sur najbara tablo surtablĝis kaj nun serĉis kukerojn. Ĉi tie sur la ĉefa placo regis bona etoso, pro la suna vetero multaj homoj troviĝis surstrate. La bazarplaco tiom viglis kiom alie nur en sabataj posttagmezoj. Rigardante la preterpasantojn la viro okupiĝis pri tute aliaj aferoj. Li trinketis kafon kaj ripete pripensis la artikolon. *“La polico ne ekskludas la eblon ke en ĉiuj tri kazoj la murdinto estas la sama.”*

Tio kompreneble estas cinika maltraigo. Pri murdo – kiel en ĉiuj aliaj artoj – artkremento evoluigas pli kaj pli sian propran rekoneblan stilon. Neniu kun iom da sperto pri arto povus erare intermiksi artaĵon de Van Gogh kun artaĵo de Picasso. Same malbone oni povus intermiksi *liajn* murdojn kun tiuj de aliaj. Kompreneble li trapasis artistan kaj personan disvolviĝon, sed lia signaturo iĝis dume tuj rekonebla – almenaŭ por ĉiuj spertuloj.

La fakto, ke ekzistis vid-atestanto por la antaŭpasinta punkto, ne multe ĉagrenis lin. “1,90 metrojn alta, fortika, malhelhara” – tiuj estas rekoniloj, kiuj ĝustas por almenaŭ 20 procentoj de la germanaj viroj. Aparte de tio, li ne estas fortika – do bone, la blua jako eble iom dikigas la figuron.

Ĉiuokaze la psikopatojn oni multe pli facile kaptas – tiujn, kiuj ne bone regas sin mem, ĉar ili havas iaspecajn obskurajn kaj kontentigendajn pasiojn. Male, li estas artkremento. Li unue elpensis koncepton, kaj nun zorge ellaboras ĝin. Neniam li murdis en urboj kie oni konis lin. Per sia verko li volis krei kontraston al la sufokanta dolĉeco de tiu rivera pejzaĝo, volis atentigi la estetike malpli klerajn homojn kaj ebligi al ili percepti la ĉirkaŭaĵon en nova maniero. Iam poste oni nomos tiun verkon lia “Mozela serio” – same kiel Monet pentris “Venecian serion” kaj Händel komponis siajn “Londonajn simfoniojn”.

Okaze ke la polico estus tro stulta por rekoni la ligojn, li devus atentigi ilin ke la morto de la dekkvarjarulino ne apartenas al liaj murdoj. Ĉar tio tute konfuzus la efikon de lia koncepto. Kion ili celis parolante pri brulvundoj?

La viro skuis la kapon. Tio ne koncernas lin. Prefere li okupiĝu pri siaj venontaj paŝoj. Sed stulte, ke tiu dekkvarjarulino aperis temprilate kaj loke tiel proksime al liaj propraj viktimoj. Artista kreado neniam facilis... La viro prenis mapon de la regiono el sia poŝo kaj malfaldis ĝin sur la tableto. Atente li elserĉis la vojon al Traben-Trarbach.

* * *

En la manĝsalono de la restoracio Doris Hanssler sidis ĉe angultablo kaj faldis buŝtukojn. La restoracio apartenis al la vinbieno Hanssler en Traben-Trarbach. Estis trankvile; la lastaj gastoj forlasis la restoracion antaŭ duona horo, kelneroj kaj kuiristoj estis en sia posttagmeza

paŭzo. Nun estis la ĝusta tempo por prepari ĉion por la vespero, kiam kutime la restoracio plenas. Ŝi paŭzis momenton gapante al la stako de la jam falditaj buŝtukoj. Deksep jarojn ŝi estis edziniĝinta al Martin Hanssler kaj lia vinbieno, kaj dum tiu tempo ŝiaj tagoj estis ĉiam la samaj. Tri semajnoj de ferioj estis la ununura lukso, kiun ili permesis al si ĉiujare – kompreneble nur en januaro, ĉar tiam la glacivino jam estas rikoltita kaj la vitoj bezonas flegon kaj zorgon nur ekde printempo. Dum la cetero de la jaro la bieno kaj la restoracio postulis dediĉon de ŝia tuta tempo. La restoracio kutime malfermiĝis tagmeze kaj vespere, tiam Doris devis kunordigi ĉion, kontroli la kelnerojn, premi la manojn de la gastoj kaj babili kun ĉiu kelkajn vortojn. Tiu estas parto de la familia etoso, kiun ŝi volis peri al la gastoj. Ĝi funkciis nur se ŝi mem ĉiam denove montriĝis en la gastejo.

Dum la antaŭtagmezoj ŝi planadis: manĝaĵon kaj tablotukojn oni devis mendi, la fakturoj estis kontrolendaj, grandaj vingustumadoj estis organizendaj. Liberajn horojn ŝi kvazaŭ ne havis, liberajn minutojn nur kelkajn. Pri partopreno en kurso de regiona popolaltlernejo aŭ similaj hobiaj Doris nur povis revii. Privatatan tempon kun sia edzo ŝi ne plu pasigis jam de jaroj. Doris denove okupiĝis pri la buŝtukoj. Faldante ilin al formo de mitro unu post la alia ŝi memoris interesan nokton pasigitan kun unu el la someraj gastoj. Poste ŝi havis amaferon kun la tegmentisto kiu estis nove kovrinta la tegmenton de la ŝedo. Dum tri monatoj ili plurfoje semajne havis kelkajn sekretajn minutojn. Tiam la viro forlasis ŝin subite.

Doris ektimis, kiam la pordo de la restoracio fermiĝis. Gasto envenis la gastejon: mezaĝa viro kun malhela hararo tondita kurta kiel ĉe sportisto. Li surhavis malhelbluan anorakon kaj ĝinzon. Ŝi ne konis lin, sed tio ne estis mirinda; ĉi tien venis multaj turistoj. Ŝi devigis sin al afabla rideco ekstarante kaj alproksimiĝante al li. “Mi tre bedaŭras”, ŝi diris, “sed ni nur post la deksepa tridek malfermos la restoracion.” Kaj ŝi bedaŭris ke ŝi ne ŝlosis la pordon.

“Domaĝe”, la viro diris, sed li evidente ne pretis foriri. Kvankam Doris ne estis malalta virino, la ulo estis je tuta kapo pli alta ol ŝi. Kaj belaspekta.

“La kuirejo momente ne funkcias”, ŝi diris hezite. “Sed se vi preferas trinki, mi povas kompreneble venigi ion al vi.”

La viro kapjesis.



Paul Cézanne: Stilleben mit Pfefferminzflasche

Tuj poste ŝi donis al li la menukarton. Dum li rigardis la elekteblojn, ŝi surtabligis la porvesperajn tablotukojn: grandan rozkoloran kaj malgrandan blankan sur ĉiun tablon. Kvankam ŝi ne rigardis al li, ŝi sentis ke li observas ŝin. Aparte li ŝajnis interesiĝi pri la dekoltaĵo de ŝia bluzo, kiam ŝi antaŭenkliniĝis por glatigi la tablotukojn. Ŝi pensis pri sia edzo, kiu nun estis en la vitejo kun siaj homoj. Antaŭ la deksepa li ne revenos hodiaŭ. Sed eĉ kiam li estis hejme, li jam delonge ne plu interesiĝis pri ŝia dekoltaĵo – kaj eĉ malpli pri ŝia korpo sub la vestaĵo. “Mi prenis la grizburĝonjan vinon el 2003”, la viro finfine diris. “Bona decido”, Doris agnoskis.

“Kvankam la bluburgonja vino el la sama jaro estas eĉ pli bongusta. Tiu estas unu el niaj plej bonaj vinoj. – Kompreneble mi ne volas enmiksiĝi en vian decidon. Ĉiu ja havas sian preferon. Mi mem trinkas nur ruĝan vinon.”

“Kial?”, li demandis scivoleme.

Ŝi ridetis delikate. “Ruĝa vino estas pli viva. Pli volupta.”

La viro altentiris la brovojn. “Kiel sango.”

Tremo trakuris ŝian dorson. En lia vido estis io sovaĝa. Ŝi memoris la gazetartikolon kiun ŝi legis matene.

“Ĉar vi tiel forte rekomendis ĝin, mi prenos la bluburgonjan vinon. Ĉu vi ne emas sidiĝi momenton?”, la viro demandis. “La tablotukoj certe povas iom atendi. Bonan vinon oni ja ĝuas plej bone duope.”

Doris iom hezitis. Ŝi ne havis multe da tempo. Pretigi la tridek tablojn certe daŭros tri kvaronojn de horo. Kaj neniaokaze la unuaj gastoj eniru duonpretan gastejon.

“Vi ne bezonas malkvietiĝi ĉar ni estas solaj aŭ pro io tia”, la viro konjektis rimarkante ŝian heziton. “Mi ne restos longe.” Dum tiuj vortoj en liaj okuloj ekaperis brilo kiu kaŭzis al ŝi eksciton. Lia rigardo sekvis ŝin ankaŭ kiam ŝi iris malantaŭen por preni la vinon. “Nur nun faru nenian eraron”, ŝi pensis. “Tia eblo ne ofte venas.”

Ŝi revenis kun du glasoj kaj sidiĝis al la tablo kun rideto. “Ĉu vi malkaŝos al mi vian naskiĝjaron?”, ŝi demandis kun palpebruma signo senkorkigante la botelon kaj enverŝante la vinon. La viro rigardis ŝin firme – kvazaŭ li pripensus ĉu li povus malkaŝi tiom de si mem. “1961”, li poste respondis.

“Bona jaro”, ŝi komentis penseme. Ŝi prizorgis la vinkelon de la domo, ankaŭ respondecis pri la aĉetado de vinoj el aliaj bienoj, kiujn oni ankaŭ ofertis en la restoracio. Iom post iom ŝi kreis propran, privatan vinejon sub la malantaŭaj arkadoj de la kelo, kie ŝi tenis kolekton el diversaj elstaraj jaroj. Sed tiujn ŝi ĝuis nur dum specialaj okazoj.

“Je via sano.”

* * *

Duonan horon kaj trikvaronan botelon pli malfrue ŝi fine konsentis montri al li la vinejon de la domo. La viro malestimis ŝin pro la evidenta malespero pro kiu ŝi altrudis sin al li. Sed ŝia deziro por amafero plifaciligos lian laboron, lian artkreadon. Fakte li jam iom nervoziĝis. Pasis la tempo; baldaŭ la dungitoj aŭ la edzo revenos. Kaj li ja devos forlasi la domon antaŭ ol li renkontus iun kiu poste povus rekoni lin!

Kompaton li ne sentis por la virino. Ĉe tiu mizera vivo, katenita al la vinbieno, dum la jaroj preteriris ŝin sen ajna apogeo, ŝi preskaŭ devus danki al li pro la distingo ke ŝi iĝos parto de lia artaĵo!

Senpacience li atendis ke ŝi prenu poŝlampon el la tirkesto de la bufedo. Ŝi malŝlosis la kelo-pordon per antikva ŝlosilo kun dentoj kaj premis la lumŝaltilon sur la muro. Ŝi subeniris la paŝtrivitajn ŝtonajn ŝtupojn kiel la unua.

Li sentis ekrideton. Vinkelo ja estas perfekta loko por murdo. Neniu povus aŭdi la kriojn, kaj la kadavron oni tie ankaŭ bone povos stoki sen ke iu trovus ĝin.

“Venu!”, la virino flustris. “Tie malantaŭe mi havas specialaĵon por vi.”

Tirante la ŝultrojn li sekvis. Ju pli malantaŭe, des pli bone por lia celo. Ŝi denove malŝlosis por-don aspektantan kiel en mezepoka kastelo kaj ĉi-foje ŝi invite gestis. “Mia plej privata kolektaĵo”, ŝi diris kun brilaj okuloj.

Li trapasis la pordon preter ŝi. Ĉe la muro estis du bretoj kun ĉirkaŭ dudek vinboteloj, ĉiuj kun manskribitaj etiketoj. Sed de la etiketoj li povis legi nur la jaron, la cetero estis tro malgranda. Li metis manon en la poŝon. Turniĝante al sia viktimo, sammomente li elprenis la garoton kaj levis la brakojn por ĉirkaŭkoligi al ŝi la draton. Sed subite li sentis iun metalaĵon premi lian flankon. Kurentoimpulso de kelkmil voltoj trafis lin. Antaŭ liaj okuloj la mondo nigriĝis. Li vekiĝis kuŝante sur malvarma kaj humida kelplanko kaj preskaŭ sufokiĝante. Forta

glubendo sur lia buŝo kaj parte ankaŭ sur la nazo malhelpis profundan enspiron. Laŭ sia temposento li estis senkonscia nur dum sekundoj, sed la virino sukcesis intertempe fikse kunŝnuri la maleolojn kaj manartikojn. Okulangle li povis vidi la elektroŝokilon, kiun li stulte miskredis poŝlampo. Ĝi nun kuŝis surplanke malantaŭ la virino.

Por li ne fareblis io alia ol senmove, kun larĝe malfermitaj okuloj rigardi Doris, kiu kvietanime elpakis grandegan kanulon. Li neniam antaŭe vidis kanulon kiel tiu ĉi, ĝi certe havis diametron de duona centimetro!

Doris levis puran, malplenan vinbotelon. "Por mia kolektaĵo", ŝi diris kontente. "El la jaro 1961 mi ankoraŭ havas neniun." Kun forta impulso ŝi ramis la kanulon profunde en lian bruston, tuj maldekstre apud la sternumo. Tranĉan doloron li sentis, kaj li ne povis eviti vidi ke helruĝa sango el la kanulo pulsante spruĉas en la botelon.

"Mi vere estas bonŝanca", diris Doris. "Unue la knabino antaŭ du tagoj kaj nun vi." Ŝia ekstaza rideto estis kion li laste vidis ekperdante la konscion.

La rakonto estas verkita de nia membrino kaj estraranino d-rino Anina Stecay. Ĝi jam aperis en Beletra almanako. Ni dankas al ŝi por la permeso, uzi ĝin por nia Esperanto-Informilo.
ke

SOMERA FESTO



Ĉu delikataj rozoj, brilaj klematidoj aŭ nimfeoj - en la ĝardeno de s-ino Rabenstein ĉio invitas al ripozo kaj spektado de bela naturo.

Se al tiu beleco venas ankaŭ la kafejo per kiu prizorgis por ni la filo Jens, tiam estas la tago plena je ĝuo.



Katarina helpas al si per malvarma, malseka tuko ĉirkaŭ la kolo, Martin Schmitt ne estas ĝenita de la varmego - li, kiel multaj junaj homoj, uzas ofte sian poŝ-



Dum Klaus Rumrich ĵonglas provas aliaj iamaniere ricevi iomete da freŝa venteto.



telefonon.



Testudo kiu ne parolas Esperanton sed tre ŝatas ŝuojn kiujn ĝi ne pre devas gustumi.



fotoj : ke

Ĉi tiu bela klematido estas el la ĝardeno de la familio Rabenstein. La festo organizita de ili estis bela, brila, ĝuinda kiel ĉi tiu floro. Ni dankas al ili por la bela tago.

DANKON!



La trampolinon de la familio Rabenstein uzis tre intense Leander Fellmann. Li ja ne pezas 100 kilogramojn kaj tre ŝatas piedpilkon. Do, li kunigis siajn du ŝatojn. Helpantino estis Shahnaz Vakili.

